

Ernest Naville, 6-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 492, 1973.03.14 & 17

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj radioprelegoj ni interesiĝas pri la vivo kaj penso de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kiu estis la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Ernest Naville havis la privilegion vivi dum preskaŭ tuta jarcento. Naskiĝinta en 1816 li mortis en 1909 93-jaraĝa. Lia ĉefa malkovro estas la proporcia balot-sistemo. La pasintan semajnon ni raportis pri la politikaj konfliktoj kun mortigoj, kiuj ripetiĝis en Ĝenevo je ĉiuj balotoj, kaj kiel en 1864 Ernest Naville alvenis al la ideo de nova balot-sistemo, kiu, anstataŭ doni ĉiujn sidlokojn en la decidpova instanco al la venkinta partio, donas al ĉiuj partioj reprezentadon laŭ iliaj reciprokaj fortoj.

Cl.- Hodiaŭ ni provos iomete klarigi, kiel funkcias tiu balotsistemo, kiu nun vere karakterizas la politikan vivon en Svislando, de la plimulto de la komunumoj, tra la kantonoj ĝis la federaciaj instancoj, kaj tio ne nur por la decidpovaj instancoj, sed ankaŭ la registaroj kaj eĉ plej diversaj organizaĵoj : lernejoj komisionoj, kunvenoj sindikataj, kulturaj societoj, kaj tiel plu, sen forgesi la tribunalojn.

A.- En balot-sistemo bazita sur la principo de la plimulto aŭ majoritato, kiam sin alfrontas du aŭ pluraj partioj, gajnas ĉiujn sidlokojn tiu, kiu havas la plimulton de la voĉoj, kondiĉe, ke ĝi akiru la duonon de la esprimitaj voĉoj plus unu. La landoj, kiuj konas tiun balotsistemon, vidas la alfrontadon de du tendencoj. Kiam unu venkis, tiam la alia ludas la rolon de opozicio. Ĝi provas faligi la venkinton. Kaj ĉiuj rimedoj estas taŭgaj, eĉ la plej demagogaj.

Cl.- Ernest Naville vidis en tiu balot-sistemo ion, kio ŝajnis al li kontraŭa al la kristanismo. Perforto, mensogemo, eĉ milita spirito regadas. Kiel kristano li malkovris kaj poste defendis sistemon, kiu ŝajnis al li multe pli justa, ĉar ĝi respektas la malplimulton kaj faras, ke ne estas plu venkito, sed nur pli aŭ mapli multnombraj delegitaroj. Por kompreni, kio estas tiu proporcia sistemo, ni diru, ke ekzemple en unu urbo estas dudekmil balotantoj por elekti cent deputitojn. Simpla kalkulo montras, ke ĉiu deputito respondas al ducent voĉoj. Jen tiu kalkulo:

A.- Dudekmil balotantoj dividitaj de la 100 elektotoj donas kiel rezulton la nombron 200, tio estas la kvanto da voĉoj, kiujn devas ricevi unu partio por rajti havi unu elektiton.

Cl.- Nun ni imagu, ke ekzistas en tiu urbo tri partioj. La partio A estas tre potenca. En baloto ĝi gajnas la 3 kvaronojn de la voĉoj. Aŭtomate ĝi ricevas 3 kvaronojn de la sidlokoj. Kontraŭe en la majoritata balotsistemo ĝi gajnus ĉiujn sidlokojn. La kalkulo estas tre simpla : Tiu partio ricevis 15'000 voĉojn. 15'000 dividita de 200 donas 75, tio estas 75 deputitoj.

A.- Ni imagu, ke la partio B estas ege malforta. Nur 200 voĉojn ĝi ricevis. Tio signifas, ke ĝi ricevas unu sidlokon. Kalkulo: 200 dividita de 200 egalas unu deputiton. Neniam en majoritata balotsistemo tiu partio povus havi reprezentanton. Ĝia sola batal-sistemo tiam estus perforta lukto. Nur tiel ĝi povus aŭdigi sian voĉon. Tiu partio povas esti grupo religia, rasa malplimulto, parolantoj de minoritata lingvo. En la proporcia balot-sistemo ĝi povas aŭdigi sian vidpunkton, eble tiu homo kapablos konvinki la tutan decidpovan ĉambron pri la praveco de sia vidpunkto.

Cl.- Nun, kiam ĉiu partio ricevis iun nombron da sidlokoj: La partio A 75, la partio B 1 kaj la partio C 24, tiam decidis, kiuj kandidatoj estas elektitaj, nur ilia vico, laŭ la nombro de la voĉoj, kiujn ĉiuj aparte ricevis. Sur la listo de la partio A la 75 kandidatoj, kiuj ricevis plej multe da voĉoj estas deklaritaj elektitaj. Sur la listo de la partio B la kandidato, kiu ricevis plej multe da voĉoj estas elektita, eĉ se estas tre malmulte konsidere al la voĉoj, kiujn ricevis la kandidatoj de la listo A.

A.- Kiam unu deputito mortas aŭ demisias, tiam ne reokazas voĉdono. Aŭtomate lin anstataŭas la postvenanta kandidato, kiu havis plej multe da voĉoj. Tio signifas, ke inter du balotoj estas vera politika paco. Tio permesas al neniu partio perdi sian plimulton inter du balotoj, kiel tio povas okazi en majoritata balotsistemo, kiam tre malgranda diferenco da voĉoj ekzistas inter la venkinta kaj venkita partioj.

Cl.- Ankaŭ la balot-teritorioj ne devas ŝanĝiĝi. Ili estas fiksitaj unu fojon por ĉiam kaj respondas al la politika divido de la lando : komunumoj, kantonoj kun eblaj distriktoj.

A.- Kiam Ernest Naville proponis tiun sistemon, ĝi ŝajnis plena utopio. Sed li kapablis konvinki eĉ kontraŭulojn, pro tio malpli ol tridek jarojn post lia unua propono, jam pluraj svisaj kantonoj estis akceptintaj tiun balotsistemon. La venontan semajnon ni diros kelkajn vortojn pri tiu interesa politika batalo, kiu donis al Svislando ties politikan etoson tute karakterizan.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!